# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 29/12/2022 Sescentdekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)




## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 686,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **297,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **150,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **146,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018
Nun studas **93,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )




## Esperanta Retradio

Donas bonan ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon



**RETE BABILI KUN ROBOTO EN ESPERANTO**
29-a de decembro 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*

# La novaĵletero deziras al siaj legantoj, Feliĉan Novjaron.

## - Zamenhof-festo en Sud-Australio- Dec. 17an, 2022

Kelkaj el nia Esperanta grupo pro diversaj kialoj ne povis ĉeesti nian Zamenhof-feston.

Tamen ni (dekope) ĝuis la diversajn Esperantajn prezentadojn: Detaloj pri la vivo de Zamenhof, malgranda kvizo pri la vivo de Z. ( ni sciis malmultajn respondojn), kelkaj ŝercoj elĉerpitaj el malnovaj "Tamen Plu" ( la iama Esperanta eldono de Sud-Aŭstralio), pupteatraĵo pri "bestperanto", kaj eĉ kristnaska kanto.

Post gustumado de multaj frandaĵoj ni fine kantis kelkajn esperantajn kantojn.

Mankas foto sed en la domo de Indrani ĉeestis - Bob Felby, Trevor S., Carol kaj Brendan Linnane, Cathy kaj Michael Taggert, Eileen J., Libby Mortimer kaj Andrew Woods (la pianisto). *Indrani Beharrylall*



## EL LA LETEROJ-SAKO DE SANKTA NIKOLAO

trovis ĝin Vera Payne

Kara Sankta Niko

Kiam mi estis infano, mia patro prifriponis mian patrinon kaj ne amis nian familion.

Poste, miaj gepatroj eksedziĝis; baldaŭ mia panjo mortis en aŭtoakcidento.

Mia frato kaj mi tiam nur povis loĝi en la tre malnova domo de avinjo.

La fratino de avinjo estis alkoholulino.

La tuta familio sin vivtenis per la ŝparaĵoj de avinjo.

Domaĝe, antaŭnelonge, avinjo forpasis.

Mia onklo, Andi, apenaŭ evitas la malliberejon.

Mia frato ellasis la domon kaj eĉ ne parolas al iu el ni nuntempe.

Paĉjo, nun 73-jaraĝa, devas labori por vivteni la familion, kaj finfine li volos, ke ankaŭ mi faru la samon.

Mi petas, bonvolu sendi ion bonan miadirekten!

Sincere via Princo Vilhelmo.

*Vera Payne*



# La mono iras en la malĝustajn poŝojn

Unue mi deziras saluti vin ĉiujn dezirante al vi "Ĝojigan Novan Jaron 2023". Se ĉiuj el ni estus honoraj kaj veremaj, la nova jaro estus ja ĝojiga kaj eĉ feliĉiga, sed bedaŭrinde troviĝas inter ni, ne nur en nia lando, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj landoj, certaj grupoj da homoj, kiuj ne laboras, sed malgraŭ tio, kredas sin mem meritantaj kiom eble el la tuta monaro en sia lando.

Ili estas nomataj politikistoj. Ili imagas sin la regantoj de la tuta mondo, kaj ili ankaŭ sentas sin tro reĝecaj por fari ion ajn. Ili certe ne povas, kaj ankaŭ ne volas, labori.

Sed ili sendube konsideras sin tro gravaj por vivi siajn vivojn sen mono. Do, ĉar ilia religio sendube estas, "ne labori", sed tamen posedi ĉiun monon ekzistantan en la ŝtato, en kiu loĝas kaj vivas tiuj saĝaj nekapablaj senlaboruloj. Sed ili ne estas tute malsaĝaj, ili nur ne kapablas senti konsciencriproĉon.

Tial ili nomas sin politikistoj. Jes, mi bone scias, nur ili mem kredas ke ili estas superaj al iu ajn. Ni ĉiuj, loĝantoj sur tiu ĉi Terglobo, estas fratoj, escepte de la virinoj, kiuj estas fratinoj. Nia devo estas, ke ni subtenu kaj helpu unu la aliajn, la tutan tempon!

Sed ial, mi mem tute ne kapablas kompreni kial, ĉar mi mem ne nur kredas, sed eĉ scias, ke niaj devoj estas ĉiame helpi unuj la aliajn. Do mi, mian tutan vivon kiel laboristo, laboregis kaj laboraĉis pro ne sufiĉe da mono. Kiam mi, post 48-hora laborsemajnaĉo, ricevis mian tro malaltan salajreton, iom de la mono ne estis por mi, ĝi apartenis al la Fakunuiĝo, se tio estas la ĝusta nomo al kiu mi estis deviga membro. Ili opiniis ke ili bezonas la monon multe pli ol mi!

Alia parto de mia salajro ankaŭ ne apartenis al mi. Ĝi apartenis al la registaro, kiu donacis ĝin al la politikistoj, kiuj opiniis, ke ili meritas almenaŭ la duoblan. Mi filaboraĉis en unu el la plej malpuraj fifabrikaĉoj en la tuta urbo, ricevis tro malaltan salajron, sed fordonis ĝin al la plej sentaŭgaj homoj, se oni povas nomi ilin tiaj. Tiuj homoj, se oni povas nomi ilin tiaj, neniam laboris, sed vivis de mia laboro kaj per mia mono.

Sed ne nur tio. Iun belan tagon ili sendis al mi fileteraĉon, en kiu ili postulis, ke mi, ĉu mi volas aŭ ne, venu al iu loko en Mirinda Kopenhago por esti pezata kaj mezurata por fariĝi, ĉu mi volas aŭ ne, mia volo signifas nenion, fariĝi fisoldataĉo kaj eliri kontraŭleĝe en fremdan landon por kontraŭleĝe fimortigaĉi kiom eble plej multe da homoj, kiuj neniam en sia vivo ofendis min. Multaj el ili estas ja esperantistoj, ĉu ne?

Do mi iris al tiu filokaĉo kie oni mezuris kaj pezis min por vidi ĉu mi estas taŭga kandidato por servi la diablon kaj liajn multajn servantojn en Mirinda Kopenhago.

Sed, kiel vi ĉiuj jam scias, ĉu ne? Mi sekvis mian konsciencon kaj rifuzis la fireligion de tiuj terure malsaĝaj fihomaĉoj!

Ne sufiĉis al ili miaj salajroj, ili volis havi ankaŭ mian tutan vivon, sed mem, ili volis movi eĉ ne sian malgrandan fingreton por fari ion ajn bonan por iu ajn alia homo!

Baldaŭ mi finos mian vivon sur tiu ĉi planedo. Ni vidu kio okazos al mi post mia foriro de ĉi tie. Mi ŝatus vidi, kio okazos al tiuj nelaboremaj monoŝtelistoj kaj hommalamantoj. Ili mem ne kuraĝis fimortigaĉi siajn kunhomojn, sed ili kuraĝis provi devigi siajn samnacianojn eliri kaj rompi ĉiujn leĝojn tion farante!

*Bob Felby*



# JU MALPLI VI LABORAS DES PLI VI ENSPEZAS

La politikistoj en ĉiuj landoj de la tuta mondo tute ne laboras, sed tamen ili estas inter la plej riĉaj, eĉ riĉegaj, el ĉiuj milionuloj en la tuta mondo! Ĉu tio estas ĝusta?

Ĉu la mono ne devus iri al la fortege laborantaj laboristoj? Nu, laŭ la opinioj de la politikistoj, certe ne! Ili opinias ke ĉiu mono devus iri al iliaj poŝoj!

Kaj por ŝteli eĉ pli da mono, ĉar, laŭ iliaj opinioj, ili ankoraŭ ne ricevas sufiĉe de la mono, kiu devus ja iri al la poŝoj de tiuj, kiuj laboras kaj deziras pacon en la tuta mondo! Sed politikistoj tute ne povas kompreni tion. Ili ja erare opinias, ke nur ili gravas. La laboristoj, laŭ la fiopinioj de la politikistoj, estas nur sklavoj, kiuj devas faraĉi kaj laboraĉi laŭ la fiopiniaĉoj de la politikistoj, ĉu ne? Kaj, laŭ la opinioj de la politikistoj, la mondo vere bezonas militojn, ĉar tio signifas eĉ multe pli da mono en iliaj poŝoj! Kaj politikistoj ankoraŭ ne lernis ke la mono ne estas nur por ili, ĉar tiuj, kiuj laboras, meritas ja multe pli da mono ol tiuj, kiuj nemiam laboras!

KAJ, NI NE FORGESU LA GEPENSIULOJN, AŬ ĈU? ILI TUTCERTE ANKORAŬ NE RICEVAS SUFIĈE DA MONO, NUN VI SCIAS KIAL, ĈU NE?

ILI DO KREAS MILITOJN KAJ DEVIGAS HONESTAJN JUNULOJN, PARDONU GEJUNULOJN, ALIĜI AL MORTIGANTAJ FIARMEAĈOJ, KIUJ SENPASPORTE KAJ KONTRAŬLEĜE ENIRAS FREMDAJN LANDOJN KAJ FIBOMBARDADAS ĈIUJN KONSTRUAĴOJN, T.E. POLICEJOJN, MALSANULEJOJN, UNIVERSITATOJN, LERNEJOJN, MALLIBEREJOJN, POŜTOFICEJOJN, FLUGHAVENOJN, FERVOJAJN STACIDOMOJN KAJ NUR DIO SCIAS KION ALIAN!

LA CERBOJ DE POLITIKISTOJ JA LABORAS TIEL. ILI PLAĈAS AL LA DIABLO, NE AL IUJ ALIAJ, ĈU NE?

SED NI, LA GEESPERANTISTOJ DE LA MONDO LABORAS POR TUTMONDA PACO!!!



TIAL NI NE PLAĈAS AL LA POLITIKISTO, LAŬ ILI, SE NENIUJ MILITOJ, NENIOM DA MONO!!! *Bob Felby*



**3ZZZ**….. En la elsendo de la 26a de decembro 2022 estas anoncita la esperantisto de la jaro, aŭdeblas ankaŭ pri sciencaj malkovroj kaj grave kial ne estas bona ideo donaci Esperanto-librojn al publikaj bibliotekoj.



www.3ZZZ.com.au aŭ www.esperanto.com.au *Franciska Toubale*

PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj ekzamenoj ★ 2023-aprilo-14/23 ★ Gresillon (Francujo)
Por ĉiu demando, skribu al kastelo@gresillon.org aŭ telefonu al +33 - 2 41 89 10 34 (respondilo)
Bonvenon en via Esperanto-kastelo Jannick kaj Bert Aliĝilo - enskribiĝo *Berto Ŝuman*